

Sin apogante sur la supra rezonado kaj la simetrio de la premisoj (aŭ rezonante analoge post la distingo de la kazoj $d < b$, $d > b$, $d = b$) ni venas al la konkludo, ke la diagonaloj AC kaj BD kruciĝas ĉe siaj mezoj.

La kvarlatero $ABCD$ estas do rombo.

La pruvojn de la teoremo kun la premisoj $w_2 - w_6$ oni povas trovi en niaj artikoloj (1995 j, 1996 j).

Ni rimarku, ke la teoremo inversa al la supre priskribita estas evidente vera.

Tial ĉiu el la atributoj $w_1 - w_6$ povus servi por difini la rombon.

Referencoj

- Górowski J., Klakla M., Łomnicki A. (1995). O czworoboku wypukłym, Gradient 7-8, 218-232
- Górowski J., Klakla M., Łomnicki A. (1996). Jeszcze o czworoboku wypukłym, Gradient 1 - 2, 14 - 25
- Górowski J., Klakla M., Łomnicki A. (1997). O pewnych własnościach czworokąta wypukłego, Matematyka 4, 206 - 209
- Górowski J., Klakla M., Łomnicki A.: 2004, Zadania „na wymuszanie” jako środek matematycznej aktywizacji uczących się, Dydaktyka Matematyki 26, 61 - 80
- Krygowska Z. (1972). Jak uczyć dowodzenia twierdzeń, Matematyka 5, 264 - 275
- Krygowska Z. (1977). Zarys dydaktyki matematyki, cz. II, WSiP, Warszawa

Adresoj de la aŭtoroj

Dr. Jan GÓROWSKI	Dr. Adam ŁOMNICKI	Prof.dr.hab. Maciej KLAKLA
Str. Na stoku 2	Str. Bielowicza 53	Str. Sądowa 7
32 087 Penkowiec	32 040 Świątniki Górne	31 542 Kraków
Pollando	Pollando	Pollando
<jangorowski@interia.pl>	<alomnicki@poczta.fm>	<smklakla@ap.krakow.pl>

Priaŭtoraj informoj

Jan Górowski kaj Adam Łomnicki estas doktoroj de matematiko kaj laboras en la Pedagogia Universitato en Krakovo (Pollando). Ĉiu el ili skribis pli ol 80 sciencajn artikolojn kaj lernolibrojn. A.Łomnicki estas esperantisto, instruisto de tiu lingvo.

Maciej Klakla, matematikisto, laboras kiel profesoro en la Pedagogia Universitato en Krakovo, skribis pli ol 130 sciencajn artikolojn kaj lernolibrojn.

Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton?

– La artikolo –

Gerald TUCKER

La lingvosistemo de la turka havas nur nedifinan, Esperanto nur difinan, la rusa neniun kaj la aliaj lingvoj de la studo kaj difinan kaj nedifinan artikolon.

Plej proksimaj al la turka estas la rusa lingvo kaj Esperanto en ĉi tiu punkto.

Pro la jam menciitaj „malfacilaĵoj” de la rusa estas por turko eble jam beno, ke tiu lingvo ne havas artikolon.

Kvankam la rilato kun Esperanto estas „renversa”, lernanta turko havas du avantaĝojn ĉe la Internacia Lingvo:

1. La artikolo de Esperanto estas preskaŭ neŝanĝebla (la / l’).
2. Turko povas lerni pere de Esperanto la fundamentan uzadon de la difina artikolo en hindeŭropaj lingvoj.

Por prijuĝi la ceterajn lingvojn, estas sencoplene denove kompari la nombron da lernendaj elementoj en la diversaj cellingvoj.

La nedifina artikolo

Lingvo	vira sing.	ina sing.	n. sing.	vira plur.	ina plur.	n. plur.
angla	a(n)	a(n)	a(n)			
Esperanto	-	-	-			
franca	un	une	- (un)			
germana	ein eines einem einen	eine einer	ein eines einem			
hispana	un(o)	una	- (un(o))	unos	unas	- (unos)
turka	bir	bir	bir			
rusa	-	-	-			

Unuavide la angla havas la plej facile lerneblan nedifinan artikolon. Tamen necesas lerni, kiamaniere decidiĝi inter *a* kaj *an* kaj kiam la prononco estas [ə(n)] aŭ [ej] kaj kiam [æn].

La tasko ne estas nesuperebla: *n* aldoniĝas antaŭ vokalo (*an apple* = pomo; turke: *bir elma*). Antaŭ konsonanto ĝi estas superflua (*a cat* = kato; turke: *bir kedi*).

Komplikiĝas kiam la sekvanta vorto komenciĝas per konsonanto *muta* (*an hour* [ə'naŭə] = horo; turke: *bir saat*). Kontraste, ĉe vere konsonanta *h* uziĝas la simpla *a*: *a house* [ə'haŭs]. La prononco [ə(n)] estas normala, [æn] aŭ [ej] emfaza.

La franca kaj hispana ankaŭ uzas po du nedifinajn artikolojn.

La franca aplikas la fenomenon de „*liaison*“, t. e. la vira artikolo „*un*“ [ē], antaŭ vokalo (kaj muta *h*) utiligas la fonemon [n] por ligi la artikolon kun la sekvanta vorto, ekz. *un homme* [ēn'otr ɔm] aŭ *un autre homme* [ēn'otr ɔm].

La hispana havus relative simplan artikolan gramatikon, se ĝi povus pli konsekvente apliki sian lingvosistemon. Tiuokaze la substantivoj finiĝantaj per *o* ĉiuj estus viraj, tiuj per *a* inaj. Tiu simetrio finiĝas jam ĉe la ĉiutaga vorto *mano* (ina) > *una mano* (= mano; turke *bir el*).

Krome multaj hispanaj substantivoj havas alian finaĵon. Preferataj estas *-d*, *-e*, *-l*, *-n*, kies genron necesas parkerigi. La pluralaj formoj cetere servas por esprimi la nocion de „kelkaj, iuj“.

La franca prezentas eĉ malpli da helpoj, ĉar la finaĵoj *o* kaj *a* kunfandiĝas por produkti *e* [ə], kiu poste fariĝis muta (*e muet*).

Neniu el la du latinidaj lingvoj konsekvence retenas la genron de la originaj latinaj vortoj, kaj ili eĉ mem ne ĉiam akordas inter si laŭ genro.

La plej ampleksan arsenalon da nedifinaj artikoloj havas la germana lingvo. Jen evidentiĝas unuafoje ke la deklinacio de la germana plenumiĝas ĉefe ne ĉe la substantivo, sed ĉe la artikolo.

La veran amplekson de ĉi tiu fenomeno montros la pritrakto de la **difina artikolo**.

La difina artikolo

Se turko volas lerni unu el la hindeŭropaj lingvoj kun latina alfabeto, li/ŝi ne povas eviti la difinan artikolon. Ĉar la turka lingvo ne posedas difinan artikolon, la plej agrabla aliro estos pere de la lingvo, kies artikolo estas plej facile alproprigebla. Videble, la angla kaj Esperanto tiusence estas la plej logikaj kandidatoj.

Lingvo	vira sing.	ina sing.	n. sing.	vira plur.	ina plur.	n. plur.
angla	<i>the</i> [ðə/ði]	<i>the</i> [ðə/ði]	<i>the</i> [ðə/ði]	<i>the</i> [ðə/ði]	<i>the</i> [ðə/ði]	<i>the</i> [ðə/ði]
Esperanto	la / l'	la / l'	la / l'	la / l'	la / l'	la / l'
franca	<i>le</i> [lə] / l'	la / l'	- (<i>le</i> [lə] / l')	<i>les</i> [le(z)]	<i>les</i> [le(z)]	<i>les</i> [le(z)]
germana	<i>der</i> <i>des</i> <i>dem</i> <i>den</i>	<i>die</i> <i>der</i> <i>der</i> <i>die</i>	<i>das</i> <i>des</i> <i>dem</i> <i>das</i>	<i>die</i> <i>der</i> <i>den</i> <i>die</i>	<i>die</i> <i>der</i> <i>den</i> <i>die</i>	<i>die</i> <i>der</i> <i>den</i> <i>die</i>
hispana	<i>el</i>	<i>la</i> (<i>el</i>)	- (<i>el</i>)	<i>los</i>	<i>las</i>	- (<i>los</i>)
turka	-	-	-	-	-	-
rusa	-	-	-	-	-	-

La angla lingvo prezentas difinan artikolon kun unu skribmaniero kaj du prononcoj. Analoge kun la nedifina artikolo, la prononco [ðə] estas por antaŭkonsonanta kaj [ði] por antaŭvokala aŭ emfaza uzo. La lernlaboro do ne estas tro granda.

Esperanto ankaŭ havas du variantojn de la difina artikolo, sed nur *la* estas por ĉiutaga uzo, dum *l'* estas literatura stilformo, por komencanto neglektebla.

La franca lingvo havas 5 formojn de la artikolo, inter ili du por antaŭvokala uzo (*l'* kaj [lez]). Ĉi-lastaj uziĝas antaŭ *h muet* (ekz. *l'heure* [lör] = la horo; sed ne antaŭ *h aspiré*: *la honte* [la 'öt] = la honto).

La hispana lingvo uzas kvar difinajn artikolojn. La vira singulara *el* uziĝas ankaŭ ĉe inaj substantivoj antaŭvokale. Tio validas krome kiam certa adjektivo kun vokala komenclitero intermetiĝas. Ne forgesinda estas ankaŭ ekzemple *la mano*, kiu havas viran finaĵon

sed inan genron.

Fine, la koŝmaro por ĉiu komencanto kun propra lingvo sen difina artikolo: la germana lingvo. Kvankam la tabelo jam estas timiga, la vera malfacilaĵo sidas aliloke. La germana havas fakte nur 6 variantojn de la artikolo (kp. la francan). Eblas bone lerni, kiu el ili apartenas al kiu kazo en kiu nombro kaj genro. Tamen la ĉefa problemo de la germana estas la **asigno de la genro**.

En sia 360-paĝa libro „*Genuszuordnung*“, Rudolf Fischer (2004, p. 323) konstatas, ke en la germana lingvo „La plej ofta kaj potenca motivo de asigno de genro estas la reproduktado“. Tio signifas ke la lernanto lernas per imitado en la lingva medio. Fischer krome indikas, ke indiĝenaj lingvanoj eble iom miras pri malĝusta asigno de genro, sed ĝenerale ĝin ignoras.

Tio precipe validas koncerne neologismojn el aliaj lingvoj, kiuj nuntempe en la germana abundas kaj kies nombro kreskadas. Regas kvazaŭ iu leĝo de precedenco. Lernantoj, kiuj ne havas la eblecon lerni en germanlingva medio dum tre longa tempo (prefere ekde la infana aĝo) eĉ kun granda talento ne havas ŝancon vere regi la asignon de genro en tiu idiomo.

Multaj turkoj kiuj loĝas jam dum longa tempo en Germanlingvujo, precipe la plej junaj, profitas de la principo de reproduktado kaj asimilas en la ĉiutaga vivo la genrajn asignojn de la societo. Tamen estas multe da necerteco ankaŭ inter ili, kaj en la kazo de la fremdvortoj, eĉ inter indiĝenoj. Strange estas konstati ke ĝuste germanoj, nome tiuj el la tjurklingvaj regionoj de la iama Sovetio, havas la saman problemon kaj ofte ne sukcesas kontentige solvi ĝin.

Koncerne la uzadon de difinaj artikoloj ĝenerale, estas konstateble ke apenaŭ ekzistas translingva akordo. Tio validas precipe por la pluralo.

Angle:	<i>people</i>
Esperanto:	(la) homoj
France:	<i>les hommes/gens</i>
Germane:	<i>die Menschen / Leute</i>
Hispane:	<i>los hombres</i>

Tamen ankaŭ en la singularo la uzado estas diversa:

Angle:	<i>man(kind)</i>	<i>science</i> [ˈsajəns]	<i>the cinema</i>
Esperanto:	la hom(ar)o	scienco	(la) kinematografio
France:	<i>l'homme</i>	<i>les sciences</i> [siˈãs]	<i>le cinéma</i>
Germane:	<i>der Mensch</i>	<i>die Wissenschaft</i>	<i>das Kino</i>
Hispane:	<i>el hombre</i>	<i>las ciencias</i>	<i>el cinema</i>

Inter la angla kaj la aliaj cellingvoj staras Esperanto kun sia pli monomorfa uzado de la difina artikolo.

Certe la plej granda problemo por turka lernanto de la hindeŭropaj lingvoj kun difina artikolo estas: kiam entute ĝin uzi? La propra lingvo nur parte helpas. Sufiĉas komparo kun tri el la cellingvoj. Grava punkto estas ke la turka deklinacias akuzative nur kiam hindeŭropa lingvo uzus difinan artikolon:

A.

Turke:	<i>Adam elma yiyor.</i> (nominativ-akuzativo)
Esperante:	La viro manĝas pomo(j)n.
France:	<i>L'homme mange une pomme / des pommes.</i>
Germane:	<i>Der Mann isst einen Apfel / Äpfel.</i>

B.

Turke:	<i>Adam elmayı yiyor. Adam elmaları yiyor.</i>
Esperante:	La viro manĝas la pomon. La viro manĝas la pomojn.
France:	<i>L'homme mange la pomme. L'homme mange les pommes.</i>
Germane:	<i>Der Mann isst den Apfel. Der Mann isst die Äpfel.</i>

La subjekto de la frazo ne prezentas grandajn problemojn. La turka lernanto – teorie – facile povas enmemorigi, ke, se antaŭ „adam“ mankas „bir“ (la nedifina artikolo), la aliaj lingvoj ofte havas difinan artikolon.

Alie estas ĉe la rekta objekto. Por formi gramatike ĝustan frazon la turko devos konscii pri sia propra intenco: Ĉu la manĝanto manĝas nur unu aŭ ĉu plurajn fruktojn? Decido, por li ŝajne ne grava, graviĝas pro la gramatikaj konvencioj de la cellingvo.

En la grupo A. la frazo en Esperanto necesigas la akuzativon, ĉar tio ne dependas de la „difineca“ principo. Esperanto ĉi tie ne postulas la difinan artikolon, sed tamen la precizecon koncerne la nombron da fruktoj.

La germana same postulas la nombran precizecon. Krome ĝi postulas la akuzativan formon de la nedifina artikolo en la okazo, ke nur unu pomo estas manĝata. Se konsumiĝas pli ol unu pomo, ne bezoniĝas artikolo, sed pluralon de la rektobjekta substantivo. „*Apfel*“ apartenas al la subsistemo „pluralo per umlaŭto kaj sen finaĵo“: *Äpfel*.

La franca estas eĉ pli postulema. Unue ĝi volas ankaŭ precizigon de la nombro. Due ĝi kaŭzas decidon pri la genro, kiu ĉe „*pomme*“ estas ina, do bezoniĝas nedifina artikolo „*une*“ en la singularo. En la pluralo ne sufiĉas la muta pluralfinaĵo „s“ – krome postuliĝas la difina artikolo en la plurala formo „*les*“.

Aldoniĝas en la franca kaj hispana mallongigitaj (kuntiritaj) formoj aŭ *prepozitivaj kompozitoj*, kiuj esprimas la dativon kaj genitivon. La hispana lingvo havas la pli konservativajn formojn:

kazo	hispana	franca	Esperanta
dativo singulara	<i>a + el > al</i>	<i>a + le > au</i> [o:]	al la
genitivo singulara	<i>de + el > del</i>	<i>de + le > du</i> [dū]	de la

En la franca ankaŭ estas mallongiga formo por la pluralo:

kazo	franca	Esperanta
dativo plurala	<i>à + les > aux</i> [o: (z)]	al la
genitivo plurala	<i>de + le > des</i> [de(z)]	de la

La grupo B. estas iom pli superrigardebla por la lingve eksterfamilia lernanto.

En la turka la laŭsistemaj morfemoj klare montras la nombron kaj la akuzativecon de la rekta objekto. Kiel kutime la vicordo de la morfemoj en la turka kaj Esperanto estas analoga. *Elmayı* (la „y“ estas intervokala prononchelpilo, t. e. ligokonsonanto) = la pomon, *elmalari* = la pomojn (post a-silabo *ler > la/r*).

Ankaŭ ĉe la franca la turka akuzativo helpas decidiĝi por la difina artikolo. Kompreneble la skribado de la litero „s“, kvankam ĝi ne prononciĝas, estas tute nekutima por la turkoj, kies lingvo an-

kaŭ havas propran „leĝon de neceso kaj sufiĉo“. Feliĉe la diversaj aspektoj kaj elparolo de „*la*“ kaj „*les*“ relativigas tion.

En la germana la akuzativo estas esprimita ĉe la (vira) singularo per la difina artikolo (*den*). La pluralo esprimiĝas en la 'plurpoma' frazo duoble (*die + Ä*), sed la akuzativo tute ne.

Kvanta morfologia analizo

La turka kaj la celloj de la studo havas gamon da artikoloj laŭkvante sufiĉe diversan. La turka havas nur unu artikolon, la nedifinan. Esperanto havas nur la difinan artikolon. La ceteraj celloj havas ambaŭ, escepte la rusan, kiu rezignas pri ambaŭ.

Lingvo	Difina art.	Nedifina art.	sumo	Faktoro
Turka	-	+	1	C – T
Angla	+	+	2	1
Esperanto	+	-	1	0
Franca	+	+	2	1
Germana	+	+	2	1
Hispana	+	+	2	1
Rusa	-	-	0	-1

Kvanta morfologia analizo de la nedifina artikolo

La **turka** liveras per sia sendeklinacia nedifina artikolo (**bir**) la eliran faktoron 1. En sia funkcio kiel artikolo ĝi havas nek kazon nek pluralon nek genron.

La **angla** nedifina artikolo (**a**) kun sia antaŭvokala alomorfo (**an**) [ə(n)], por emfazo prononceblaj [ej] kaj [æn], amasigas cellovan (CL-)faktoron 4. Ne havante difinan artikolon,

Esperanto prezentas CL-faktoron 0. La **franca** duforma nedifina artikolo genrodependa (**un/une** [ẽ/ün]), kun alofona antaŭvokala formo [ẽn], liveras CL-faktoron 3.

En la **germana** la formoj de la nedifina artikolo dependas de tri genroj (♂/♀/n) kaj kvar kazoj. La formo **ein** [ajn] reprezentas la

viran kaj neŭtran nominativojn kaj la neŭtran akuzativon. La formo *eine* ['ajnə] indikas la nominativon kaj akuzativon de la ina genro. La dativon de la vira kaj neŭtra genroj montras la formo *einem* ['ajnəm] kaj per *aines* ['ajnes] ambaŭ genroj esprimas la genitivon. La **germana** do, kun 3 genroj, 4 kazoj kaj 6 formoj, sumigas la CL-faktoron **13**.

La nedifina artikolo de la **hispana**, kun du genrodependaj formoj *un / una*, havas la CL-faktoron **4**.

La rezigno de la **rusa** pri difina artikolo produktas CL-faktoron **0**.

La kvanta morfologia analizo montras jenan rezulton:

Lingvo	sumo	Faktoro	h
Turka	1	C - T	
Angla	4	3	
Esperanto	0	-1	
Franca	3	2	0,5
Germana	13	12	
Hispana	3	2	
Rusa	0	-1	0,5

Por atingi decidan rezulton inter lingvoj kun la sama sumo, ĉi tie uziĝas "handikapo" (h) por la lingvoj kun malpli sistemkonforma ortografio. Tiel la franca kaj la rusa ricevas sumon pli altigitan je 0,5.

Aplikante la handikapon, ni kreas novan tabelon, kiu ebligas la enrangigon de la celloj laŭ kvanta morfologia amplekso.

Tabelo post apliko de la ortografia handikapo		Enrangigo		
Lingvo	Faktoro	Rango	Lingvo	Faktoro
Angla	3	1	Esperanto	-1
Esperanto	-1	2	Rusa	-0,5
Franca	2,5	3	Hispana	2
Germana	12	4	Franca	2,5
Hispana	2	5	Angla	3
Rusa	-0,5	6	Germana	12

Kvanta morfologia analizo de la difina artikolo

La **turka**, ne havante difinan artikolon, prezentas eliran faktoron **0**.

La **angla** posedas unu ortografie senŝanĝan difinan artikolon *the* [ðə] kun alofona prononco antaŭvokala [ði]. Ĝi varias nek laŭ nombro nek genro nek kazo. La tre ofte bezonata vorteto uzas la fonemon [ð], fremdan ne nur al turkoj, sed ankaŭ al ĉiuj ceteraj celloj kun la escepto de la hispana. Tio rezultigas CL-faktoron **3**.

Ankaŭ **Esperanto** disponas pri unu difina artikolo *la*, kiu povas esti postvokale kaj poezicele sed neniam devige malongigata al *l'*. Ĝi indikas nur difinecon, sed nek genron nek kazon nek nombron. CL-faktoro **2**.

En la **franca** la difina artikolo indikas genron kaj nombron, sed ne kazon. La difinaj artikoloj estas *le* [lə] (♂), *la* (♀) kaj *les* [le] (plurala ambaŭgenra). Antaŭvokale la singularaj formoj devige reduktiĝas al *l'*. La plurala formo *les* submetiĝas al la **ligoregulo** (*liaison*) tiel, ke la fina *-s* prononciĝas [z] antaŭvokale.

Grandan rolon por la enrangigo ludas ankaŭ la *prepozitivaj kompozitoj*. La franca difina artikolo povas kunfandiĝi kun la prepozicioj *à* kaj *de* por plenumi la funkciojn, i. a., de la dativo kaj la genitivo. La fenomeno manifestiĝas nur en la vira kaj plurala formoj kaj meritas ioman pritrakton de ĝia evoluo, kies interŝtupoj pluviavas en la hispana (vd. tie):

elementoj	interŝtupo	mutacio	nuna formo	antaŭvokale
<i>à + le</i>	<i>al</i>	[aŭ]	<i>au</i> [o:]	<i>à l'</i>
<i>à + les</i>	<i>als</i>	[aŭs]	<i>aux</i> [o:]	[o:z]
<i>de + le</i>	<i>del</i>	[deŭ]	<i>du</i> [dū]	<i>de l'</i> [dəl]
<i>de + les</i>	<i>dels</i>	[des]	<i>des</i> [de]	[de:z]

La franca liveras CL-faktoron **11**.

La **germana** kiel sola cellingvo de la studo prezentas difinan artikolon kun **3** genroj, **4** kazoj kaj **3** pluralaj formoj. La artikolo havas **6** formojn por plenumi **14** funkciojn. Akcesore konstateblas averaĝo por ĉiu artikolo de **2,33** funkcioj:

Difina artikolo	Singularaj funkcioj			Pluralaj funkcioj	Nombro da funkcioj
	viraj	inaj	neŭtraj		
<i>das</i>			nom./aku.		2
<i>dem</i>	dat.		dat.		2
<i>den</i>	aku.			dat.	2
<i>der</i>	nom.	gen.		gen.	3
<i>des</i>	gen.	gen.			2
<i>die</i>		nom./aku.		nom.	3
					14

Ankaŭ la germana uzas *prepozitivajn kompozitojn* ĉe la difina artikolo, kiuj limiĝas al la dativo kaj akuzativo. Ili estas tre popularaj, sed ne ĉiam devigaj:

Prepozicio	Artikolo	Dativa kompozito	Akuzativa kompozito	Nombro da kompozitoj
<i>an</i>	<i>dem/das</i>	<i>am</i>	<i>ans</i>	2
<i>auf</i>	<i>das</i>		<i>aufs</i>	1
<i>bei</i>	<i>dem</i>	<i>beim</i>		1
<i>durch</i>	<i>das</i>		<i>durchs</i>	1
<i>für</i>	<i>den/das</i>		<i>fürn/fürs</i>	2
<i>gegen</i>	<i>das</i>		<i>gegens</i>	1
<i>in</i>	<i>dem/das</i>	<i>im</i>	<i>ins</i>	2
<i>um</i>	<i>das</i>		<i>ums</i>	1
<i>von</i>	<i>dem</i>	<i>vom</i>		1
<i>über</i>	<i>dem/den/das</i>	<i>überm</i>	<i>übern/übers</i>	3
<i>zu</i>	<i>dem/der</i>	<i>zum/zur</i>		2
11		7	10	17

La **14** funkcioj kaj la **17** kompozitoj liveras CL-faktoron **31**.

La difina artikolo de la **hispana** lingvo spegulas kvazaŭ antaŭŝupon de la franca (vd. tie). Ĝi indikas genron kaj nombron, sed ne kazon, kaj havas 4 formojn:

nombro ▼	genro ♂	genro ♀
singularo	<i>el</i>	<i>la</i>
pluralo	<i>los</i>	<i>las</i>

La hispana krome havas devigajn **prepozitivajn kompozitojn**, sed nur en la singularo:

<i>a + el</i>	<i>> al</i>
<i>de + el</i>	<i>> del</i>

Tio rezultigas **hispanan** CL-faktoron **6**.

Rezignante pri ajna artikolo, la **rusa** produktas CL-faktoron **0**. La tabelo por la difina artikolo montras jenan rezulton:

Lingvo	Σ	Faktoro
Turka	1	C – T
Angla	3	2
Esperanto	2	1
Franca	11	10
Germana	31	30
Hispana	6	5
Rusa	0	-1

Enrangigo		
Rango	Lingvo	Faktoro
1	Rusa	-1
2	Esperanto	1
3	Angla	2
4	Hispana	5
5	Franca	10
6	Germana	29

La adicio de la enrangigaj faktoroj de la nedifina kaj difina artikoloj donas finkalkulon:

Per la adicio de la CL-faktoroj nun eblas prezenti la finan enrangigon. Rimarkinde estas ke la fina enrangigo estas identa kun tiu de la difina artikolo. Nur la germana restis je la sama nivelo.

La rusa kaj Esperanto interŝanĝis la rangon, la angla finis du rangojn pli alte, la aliaj falis je unu. La ekstremoj de la enrangigo

Lingvo	nedifina	difina	sumo
Angla	3	2	5
Esperanto	-1	1	0
Franca	2	10	12
Germana	12	30	42
Hispana	2	5	7
Rusa	-1	-1	-2

Kontraŭe al la nedifina, la rezultoj por la difina artikolo estas tiel eldiraj ke la "handikapo" ne plu bezoniĝas kaj en la fina adicio ne ludas rolon.

ĉe la artikolo manifestiĝas en ĝia totala manko en la cetere forte fleksia rusa lingvo kaj la amaso da funkcioj, kiujn la germana artikolo plenumas, dum ĝiaj substantiva kaj adjektiva deklinacioj signife reduktiĝis en la kuro de ĝia evoluo.

La finkalkulo de la esploro pri la artikolo en la turka kaj la cellingvoj rezultigas jenan tabelon:

Enrangigo		
Rango	Lingvo	Faktoro
1	Rusa	-2
2	Esperanto	0
3	Angla	5
4	Hispana	7
5	Franca	12
6	Germana	42

Por turka lernonto la pozicio de Esperanto en la tabelo havas la propedeŭtikan avantaĝon ke ĝi ebligas lerni la uzadon de difina artikolo en hindeŭropa lingvo sen la deviigoj pro morfologia amplekso kaj konfuzaj nekonsekvencaĵoj. Tiuj ĉi kreskas el la envicigo de objektaj substantivoj ĉe la vira aŭ ina genro, en la germana eĉ personaj substantivoj al la neŭtra genro (vidu tie).

La rezulto de ĉi tiu parto de la studo relative ĝas sur la fono de la adjektiva kaj substantiva deklinacioj, kiu des pli reliefigos en la pritrakto de akordo inter la substantivo kaj ĝiaj determinantoj.

Fontoj:

Por la **Turka**: Çakır, Pons Grammatik kurz & bündig ENGLISCH, Stuttgart, 2007, ĉap. 6, p. 40

Por la **Angla**: Buckenmaier, Pons Grammatik kurz & bündig ENGLISCH, Stuttgart, 2008

<http://owl.english.purdue.edu/owl/resource/540/01/>

<http://www.learnenglish.de/grammar/articlestext.htm>

Por **Esperanto**: <http://lingvakritiko.com/2007/02/05/la-artikolo/>

<http://www.esperanto.mv.ru/PMEG/gramatiko/difiniloj/la/index.html>

Kalocsay-Waringhien, Plena Analiza Gramatiko, UEA, Rotterdam, 1980, art. 76, p. 95

Willkommen, Esperanto-Grammatik, Helmut Buske Verlag, Hamburg, 2001, 3.5, p. 51

Por la **Franca**: Forst, Pons Grammatik kurz & bündig FRANZÖSISCH, Stuttgart, 2005, ĉap. 1, p. 8

<http://www.etudes-litteraires.com/article.php>

Por la **Germana**: Fischer, Genuszuordnung, Europäischer Verlag der Wissenschaften, Frankfurt, 2004, Neubold, Grammatik kurz & bündig DEUTSCH, Stuttgart, 2008, ĉap. 1, p. 8

Por la **Hispana**: <http://www.spanisch-lernen-spanien.de/grammatik/artikel.php>

Segoviano, Pons Grammatik kurz & bündig SPANISCH, Stuttgart, 2008, ĉap. 2, p. 17

Por la **Rusa**: mankas pro manko de artikolo en la rusa lingvo.

(daŭrigota)

Adreso de la aŭtoro

Gerald TUCKER

Breitenbergstrasse 7

DE - 86163 Augsburg / GERMANIO

<g.tucker@gmx.de>

Priaŭtora informo

Gepatra lingvo: usona-angla. Lernis la turkan en universitato. Ekde 1972 fakestro por ekzamenoj de Germana Esperanto-Instituto.